



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 8-a de Septembro 2020

(zom-kunveno)

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Gabi Zeevi.

Protokolo de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.

La Estraro de ELI esprimas sian elkoran kondolencon al nia amiko, Eldad Salzman kaj ties familio, pro la forpaso de lia patrino.

1. Raportoj

- a) **Jehoŝua:** dank' al la kampanjo gvidita de Amri, komence de Aŭgusto partoprenis en la Virtuala Kongreso (kiu okazis anstataŭ la Montreala UK) **48** israelanoj, deko el ili aldonitaj far UEA helpe de la Fondaĵo Canuto.
- b) **Amri** proponis al la estraro de UEA plilongigi la eblecon vidi rete la spektaklojn de la VK, kaj tio eblos ĝis la 20-a de Septembro; li krome proponis, ke nun ĝi estu senpaga – sed UEA ebligis nur por pagintaj membroj.
- c) **Jehoŝua:** la tradicia SOMER-kunveno ĉe la restoracio “Alter Nativ” okazis la 25-an de Aŭgusto. Partoprenis 8 personoj – iuj el la promesintoj forestis, sed aliaj venis surprize.
- ĉ) **Jehoŝua:** Amos Ŝapira prenis 3,500 NIS de la luantoj por Aŭgusto. Alvenis pag-postulo de la akvo-livera instanco de Bat-Jam, kiun Amos Ŝapira transdonis al la luantoj.
- d) **Jehoŝua:** urĝaj tub-riparoj necesas en la Dratverejo kaj ni devos pagi nian parton – ĉ. 750 NIS.
- e) Laŭ la propono de **Amri** la UEA-estraro oficiale transigos Israelon ekde 2021 al Kategorio 4, sen la bezono subvencii la membrotizojn per la Fondaĵo Canuto.

2. Poŝt-problemoj en ELI (Jehoŝua)

La poŝtkesto de ELI situas interne de la filio, do ne alireblas vespere. Dror estas petata kaj akceptis viziti ĝin helpe al Amos Ŝapira. **Decido unuanime:** ELI repagos ankaŭ tiujn vojaĝ-elspezojn, kiel ĝenerale ĉiujn specialajn elspezojn, ligitajn al la funkciado de la Asocio.

3. Plilongigo de la lu-kontrakto pri Dratverejo (Ŝlomo)

- a) La Estraro de ELI proponas plilongigi la ĝisnunan kontrakton kun la luantoj (valida ĝis la 16-a de Oktobro) sub la jenaj kondiĉoj:
 - 1) La nova sumo estos eventuale kalkulita tiel: plialtigo de la nunaj 3,000 NIS laŭ la indekso plus 100 sikloj;
 - 2) En aparta apendico al la Kontrakto, krom la nova monata pago, estos detalitaj laŭeblaj monataj sumoj de la repago de la ĝisnuna ŝuldo, kun difinita minimumo (ekzemple: *ne malpli ol 500 NIS...*);

.../2



– 2 –

3) Ni postulos novan sekurĉekon, kies garantianto estu konatigita al ni per ĉiuj personaj datumojn. **Voĉdono: unuanime akceptita!**

b) Eventuale ni kontrolos la ekonomian fidindecon de la garantianto pere de “*We check*” – depende de la prostulata prezo.

c) Se la luanto ne trovos garantianton, ni klopodos sekurigi liajn monatajn lupagojn pere de “*We check*” kontraŭ 2%-a kurtaĝo.

ĉ) Gabi formulu por Jehoŝua malneton de la supre menciita Apendico.

d) Ĉar la ĝisnuna kontrakto estis preparita far advokato, verŝajne ne estas bezonata plia jura helpo.

4. Israela Esperantisto n-ro 169 (Mikaelo)

a) La bulteno estis sendita al Amri, kaj tiu transigis ĝin al la presejo. Ni mendis 230 ekzemplerojn, 28-paĝajn, ambaŭ kovrilpaĝoj estas ekstere kaj interne koloraj (plenkolora revuo preskaŭ duobligus la prezon!).

b) Mikaelo sendos al Amri la adresitajn kovertojn, Amri enkovertigos kaj enpoŝtigos la bultenojn (ankaŭ eksterlanden).

c) Mikaelo jam komencis la laboron pri la n-ro 170. Interalie estos en ĝi iom da informoj pri Israelo.

ĉ) Ĉiuj akceptis la ideon de Mikaelo enketi en la venonta numero pri eventuala cedo pri papera bulteno favore al la reta. **Gabi:** ĉu duonigi la abonprezon por eksterlandanoj kontraŭ cedo pri la papera formo? La israelanoj ja ĉiuokaze pagas membro-kotizon, kiu inkluzivas la bultenon – kvankam rajtas cedi pri la papero kaj legi ĝin rete. Se temas pri la eksterlandanoj – ni ŝparus la presadon kaj la poŝt-elspezojn! **Ĝenerala konsento!**

d) En la 170-a n-ro ELI esprimos kondolencon al Eldad, nia membro. Laŭ la propono de **Gabi**, simile al la bulteno *Esperanto*, en la rubriko *Forpasoj*, aperu en n-ro 170 mencioj **pri ĉiuj niaj membroj**, kiuj havis familian funebbron dum la lastaj monatoj. **Amri:** oni transdonu al Mikaelo ĉiujn eventualajn nomojn.

La venonta kunsido: la 13-an de Oktobro, 2020, je la horo 20h00 (*zom-kunveno*)

Protokolis: Gabi Zeevi